# *Sesias en Jamajko la 39-a pintkunsido de ?tatestroj de la kariba komunumo.*



Montego Bay, 5 jul (RHK) Komenci?is la ordinara kunsido de la konferenco de ?tatestroj de la kariba komunumo (Caricom) en la kongresa centro de Montego Bay en St. James, Jamajko, ?efe fokusita en la starigo de la ekonomio kaj merkato komuna de Caricom, inter aliaj temoj.

La kunsido, kiu efektivigas sian kunsidon 39-an kaj sesios ?is vendredo, estas prezidita de la ?efministro de Jamajko, Andrew Holness, la? raportis la televida ?eno Telesur.

La kunsido bonvenigis la ?uselektitajn ?tatestrojn de Barbado, Mia Mottley, de Grenado, Keith Mitchell, kaj de Antikvo kaj Barbudo, Gaston Browne. Kiel speciala invitito estas la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel.

Dum tri tagoj, la ?tatestroj debatas tiklajn temojn kiuj havas gravajn sekvojn en la ekonomia kaj socia evoluo de la regiono, kiel strategio por sekureco fronte al krimo kaj perforto, kiel alfronti la naturajn fenomenojn kiuj dama?as la regionon, interalie, huraganojn kaj tropikajn ?tormojn, kaj la klimatan ?an?on.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/166166-sesias-en-jamajko-la-39-a-pintkunsido-de-statestroj-de-la-kariba-komunumo

**Radio Habana Cuba**